



## **FEDERACIA KUNVENO ( EN BÉZIERS, LA 27AN DE SEPTEMBRO )**

Partoprenis dudeko da geesperantistoj, senkulpiĝis pluraj . Nereprezentitaj Gard kaj Orientaj Pireneoj . Pro neĉeesto de la sekretario, laŭmemoraj notoj .

La prezidanto, post bonvenigaj vortoj, substrekis, ke lastatempe estis indikoj pri nova interesiĝo pri la lingva problemoj kaj E<sup>o</sup> . Ĉiu ricevis folion kun la tagordo kaj post kompletigo, ni detaligis ĉiun el la 20 punktoj . Memore al nia amiko Jean Gauthier, kiu forpasis ĉijare, ni subskribis kondolencleteron al lia vidvino kaj silentis kelkajn momentojn .

Sekve de freŝdata artikolo en "Télérama", iuj el ni kontaktos la gazeton por reĝustigi iujn dirojn .

Pluraj parolis pri sia partopreno en diversaj eventoj en Esperantio ĉi-somere; SFS aperigas la ricevatajn kontribuojn . La E<sup>o</sup>-budoj de la forumoj de asocioj (Béziers, Montpellier, kio pri Agde?) estis bone vizitataj . Espereble tio rezultigos novajn gelernantojn . Pluraj klarigoj al tiu nova intereso : konsciiĝo pri la lingva problemoj en Eŭropo, ankaŭ pri la malfacilaj internaciaj rilatoj okaze de sociaj forumoj, deziro distanciĝi de la politiko de Bush-Blair...

La turisma semajno en Lozère bonsukcesis malgraŭ la manko de bela vetero kaj de esperantistoj de la regiono . Christian Mouré raportis pri la provo enkonduki E-on en mezgradan lernejon de Lunel . Granda entuziasmo de la gelernantoj ; anonco por trovi korespondemajn klasojn rezultigis proponojn el diversaj landoj . Gratulojn al CM kaj Hélène Cazejust ; la federacio helpas finance laŭbezone . *Vidu p. 10.*

Sekve de la kongreso de Lozère, la federacio subskribis kontrakton kun E<sup>o</sup>-France . Iu devos reprezenti nian federacion je la kunvenoj en Parizo; provizore J. Hénin estos la delegito sed li sciigas, ke la fervojaj rilatoj kun Parizo malboniĝis kaj estus pli oportune elekti iun el 34 (eventuala helpo de la federacio por la vojaĝ-kostoj) . Christian Pinard (66) estas nova komitatano de UFE (E<sup>o</sup>-France) .

Baloto en 2004 : UFE jam pretigis leterojn sendotajn al la partioj kaj kandidatoj . Nenio nova pri "E<sup>o</sup>-Vive", kiu limigos sin al Francio .

Nova prospekto estis pretigita antaŭ la forumoj de asocioj . Rimarkoj alvenis nur poste . Iuj plendas, ke ĝi estas tro densa . JH respondas, ke ni devas disponi pri tuta gamo da dokumentoj, de tre simpla ĝis tre kompleta, laŭ la petoj . Arie Bouman montras, kiel aspektas simpla karto kun la 16 reguloj kaj adresoj (karto facile farebla kaj transportebla) . Claudine Poncy sugestas, ke ni ankaŭ disponu pri teksto en ambaŭ lingvoj (F kaj E<sup>o</sup>), ĉar homoj volas vidi (aŭ aŭdi), kiel aspektas la lingvo . La nova prospekto estis presita je 500 ekzempleroj . do, post la ĉijaraj forumoj, kaj la sendo al ĉiu leganto de SFS, restos nur kelkaj dekoj (peteblaj al SFS) . Renato Figueira realigis du belajn novajn banderolojn, ni kore dankas lin pro la laboro farita . Nur necesos aldoni truringetojn por facile pendigi ilin .

SFS : malgraŭ deficiteto ni konservas la saman abontarifon . La enhavo dependas kompreneble de la kontribuoj . Oni sendu originalojn ( tekstoj troveblaj en ĉiuj E<sup>o</sup>-gazetoj duoninteresas) kaj respektu la limdaton (malfrua SFS signifas, ke la redaktoro aŭ la sendanto ne estis liberaj post la limdato) .

Federacia repaĝaro : Mikaelo Simon malfeliĉe ne finpretigis nek ĝisdatigis regule la tekstojn; li bonvolu plej baldaŭ rilati kun Christian Pinard, kiun ni komisias por la tasko, grava por konigi esperanton al retanoj .

Retinterŝanĝoj : pluraj federacioj jam havas retadreson, kiu ebligas al la membroj interŝanĝi ideojn . Ĉu estos sufiĉe da federacianoj interesataj por lanĉi la aferon ? Rilati kun [Jean.Henin@wanadoo.fr](mailto:Jean.Henin@wanadoo.fr) . Rekonsiderenda afero .

Federacia kongreso : krom se estos alia aranĝo en nia regiono, ni elektas la semajnfinojn 24-25an de aprilo (inter la paskaj ferioj, la staĝo de Agde, la nacia kongreso, ktp) . La Sat-Amikara kongreso okazos du semajnojn pli frue . Okazigi la kongreson dimanĉe ebligus al kelkaj personoj partopreni . Colette Carbonnel esploros la eblecojn (kunvenejo, ktp) en Narbonne . Espereble aperos informoj en la venonta SFS .

Federacia estraro : en 2004 estas renovigebla la estraro (prezidanto, sekretario, kasistino) . Homoj pretaj respondeci (responsi) pripensu kandidatiĝon .

En la parto "diversaĵoj", estis legata granda parto de la letero de "Réinsertion", kiu alvokas al monhelpo .

Estis ankaŭ disdonitaj kopioj de tiu letero . Thierry Saladin mencias nekontentigan rezulton de la klopodoj en la lernejoj (kursoj en 4 lernejoj kiel lastjare) . Ĉiu decidu, se li/ŝi volas apogi finance la asocion (simpla aliĝo aŭ donaco) . La teksto de la helpopeto estas disponebla ĉe SFS .

Ĉar la Eŭropa Komisiono pretas konsideri peticion kun unu miliono da subskriboj de civitanoj de la Unio, "Esperanto Vive" (C. Garino en Chambéry) lanĉis peticion por oficialigi E-on en la Eŭropaj institucioj kaj lernejoj . Pluraj federacianoj jam kolektis subskribojn . Estas bedaŭrinde, ke tiu nova iniciato de C. Garino ne ricevis la subtenon de la nacia asocio (Ĉu ĝi estis prezentita al UFE / Sat-Amikaro ?) . Klopodoj havas ŝancon sukcesu, nur kiam plej multaj esperantistoj pretas helpi .

Poŝtmarko pri E<sup>o</sup> : nun estas tempo denove starigi la demandon (alproksimiĝas la centa datreveno de la unua kongreso en Boulogne) . Madeleine Vidal pli frue kontaktis Vincent Charlot sed ne ricevis pozitivan respondon .

(fino p. 3)

**NOTOJ :**

**SFS :** La abono por 2004 restas la sama : 6<sup>E</sup>.  
Ne atendu realvokon... por reaboni . Faciligu la laboron de tiuj, kiuj klopodas vivigi SFS, nian komunan ligilon . Se vi ne apartenas al grupo, bonvolu sendi vian ĉekon al nia kasistino,  
**Lucette Négron, 40 Chemin des Amandiers 34400 Lunel** . Skribu ĝin, ne je la nomo de la kasistino (tio okazas tro ofte !) sed de "**Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon**" (la poŝtĉekkonto estas 956-28 P Montpellier) .  
*Anticipan dankon !*

**Espéranto-France (UFE) :**

Esperantisto estas membro de granda familio . La nacia asocio (UFE) kaj la internacia (UEA : Universala Esperanto Asocio) ankaŭ bezonas vian subtenon, ne nur moralan sed ankaŭ financan . Por gejunuloj, respektive JEFO kaj TEJO . Petu de SFS la folion kun la diversaj eblaj aliĝoj kaj kotizoj . Ĉi-jare la membroj de E<sup>o</sup>-France ricevos membro-karton kun indikoj pri la varbado de novaj amikoj de esperanto . E<sup>o</sup> , ĉies afero !

**Espéranto-Jeunes :**

La eks-prezidanto de JEFO ( franca asocio), Bertrand Hugon estis elektita prezidanto de TEJO (tutmonda asocio); Alex Kadar (ankaŭ de Jefe), fariĝis la ĝenerala sekretario de Tejo .  
Ludivine Delnatte -ŝi devenas de nia regiono- kiu pli frue deĵoris ĉe UFE, estis elektita prezidant(in) de JEFO . Ni deziras al ŝi bonan sukceson .

**UK (Universala Kongreso) de Gotenburg :**

Kunvenis pli ol 1800 personoj el 62 landoj . La plej ampleksa grupo estis la franca (pli ol 200) . Kongrestemo : Lingvaj rajtoj kaj respondecoj . Temas pri lingva diverseco (konservinda/enda) kaj lingva egaleco (postulata) . Dum la malferma ceremonio prelegis (franclingve) Profesoro Charles Durand, aŭtoro de "La mise en place des monopoles du savoir", kiu proponas alternativon al la "coca-colanisation" . *Dekstre, parto de artikolo (intervjuo de Mireille Grosjean) el "L'Impartial", ĉiutaga gazeto de La-Chaux-de-Fonds (Svislando), kie disvolviĝis en julio kongreso de SAT (cento da partoprenintoj) .*

**"Le Monde diplomatique" :**

aperas en esperanto sur la reta eldono de la konata monatgazeto . Temas pri politikaj analizoj pri mondaj kaj regionaj evoluoj kaj eventoj . Respondecas pri la E<sup>o</sup>-eldono, Vilhelmo Lutermano, bone konata en nia regiono :  
<http://eo.mondediplo.com>

**Ĉapelitaj literoj :**

...ne plu estas problemo . La granda firmao de tiparoj "Linotype" proponas nun en "Opentype" la E-ajn ĉapelitajn literojn (entute milon da tipoj) .

**Kalendareto :**

La poŝtkarta kalendaro de IEI (Internacia E<sup>o</sup>-instituto, Riouwstraat 172 - NL-2585 HW Den Haag - Nederlando) por la jaro 2004 estas jam havebla . Ĝi utilas, ekzemple, por sendi novjarajn bondezirojn al geamikoj aŭ donaci al viaj E<sup>o</sup>-geleernantoj . Prezoj (sen sendokostoj) :  
1 ekz : 0<sup>E</sup>60 5 ekz : 2<sup>E</sup>40 10 ekz : 4<sup>E</sup>80 25 ekz : 12<sup>E</sup> 50 ekz : 24<sup>E</sup> 100 ekz : 48<sup>E</sup> 500 ekz : 240<sup>E</sup>  
(sendkostoj inkluzivitaj por la sendo de 500 ekz.)

**Zagreba metodo : 20a lingvo**

Tiu baza lernolibro (ekzemple Metodo 11) aperis en sia dudeka lingvo, la rusa . Ellaborita en 1980 de kvaropo (inter ili Roger Imbert), ĝi aperis unue en la kroata . venis poste adaptitoj en diversaj lingvoj, ne kalkulante 6 eldonojn "nigre adaptitajn" .

**Boom sur internet**

L'image sectaire et vieillotte qui s'attache encore à l'espéranto est battue en brèche par les chiffres. «*En tapant 'espéranto' par le biais de Google, on trouve 188.000 mentions.*» Une langue parlée par cinq millions de locuteurs – toujours en augmentation –, «*l'une des dix langues les plus utilisées sur internet et l'une des trente langues les plus utilisées au monde.*» Partout? «*Nous ne touchons pas encore tous les pays africains et arabes. Mais l'espéranto marche très bien en Iran, en Chine également.*» En Corée du Nord, «*les espérantophones ont disparu. Hitler et Staline avaient déjà été de grands exemples. C'est aussi ce qu'ont vécu les Roumains jusqu'en 1989.*»

**Le Rotary du pauvre**

Les délégués espérantophones du monde entier sont répertoriés dans un petit guide qualifié de «Rotary du pauvre». «*Ça ne coûte pas cher d'apprendre l'espéranto. On peut même l'apprendre tout seul par internet.*» Depuis qu'elle y figure, Mireille Grosjean reçoit les demandes les plus variées: un universitaire japonais désirent avoir les réglementations étrangères en matière d'animaux de laboratoire, un traducteur australien s'enquérant des tarifs de traduction du monde entier... Et l'exemple le plus marquant: «*La Croix-Rouge a utilisé en 1918 ce réseau de délégués d'espérantophones mondiaux pour reconstituer les familles dispersées par la guerre.*» /CLD

**Fino de la raporto de la paĝo 2a :**

Socia forumo en la pariza regiono en novembro : Pluraj deziras partopreni . Estos du E<sup>o</sup>-budoj, 1 de Sat-Amikaro kaj 1 de Fet (membro de Ufe), eble pli .  
Stokado de la materialo : gravas scii, kie troviĝas la federacia materialo (paneloj, aparatoj, banderoloj) .  
Krom la televidilo/magnetoskopo en Lozère, la resto estos provizore ĉe Lucette Négron en Lunel, Prunteprenebla komprenebla de ĉiu federaciano .  
Je 16h15 ni finis la kunvenon kaj rendezuis je la venonta okazo (eble por la Zamenhofa tago) en Decembro . Bonan poresperantan laboron !

## VIVO DE LA GRUPOJ

### BÉZIERS

Post la somera varmego ni rekomencas nian laboron . Ĉiuj septembraj sabatoj estis dediĉitaj al esperanto . La "Aleoj de Asocioj" okazis la 13an de septembro kun sufiĉe da sukceso : 4 novaj gelernantoj enskribiĝis por kurso, kaj 2 tuj restudos post kelkaj jaroj de ripozo . Gratulojn kaj dankojn al ĉiuj, kiuj sindoneme laboris dum tiu tago .

**KUNVENOJ :** Pro diversaj kialoj, ne okazos kunveno en oktobro. Do nia venonta kunveno estos la **8an de novembro, je 14h** .

**ZAMENHOFA TAGO :** Ni festos tiun tagon la **13an de decembro** . Notu bone, ke ni antaŭvidis la 6an de decembro, sed ni estis devigataj modifi tiun daton . Do, la 13an de decembro, ekde la 10a horo matene en MVA (Maison de la vie associative) . Poste, ni kune manĝos en restoracio "Les Comédiens", iom proksima de MVA apud la kanalo (Port Neuf). Prezo : pli malpli 16<sup>€</sup> . Post la manĝo : distra parto .

En 2004 la unua kunveno okazos la **10an de januaro je 14h** en MVA . Ni esperas, ke vi venos multaj kun bonaj novaj ideoj por gajigi kaj vigligi niajn renkontiĝojn .

**STAĜO :** Ĝi okazos fine de majo (de la 19a ĝis la 26a) . Ni ne povas ankoraŭ precizigi detalojn . Vidu la venontan SFS . Ĝis baldaŭ en la 8a de novembro, je 14h . Amike . S. A.

**Persona afero :** S. Authier akceptis dum unu monato sian ĉefan korespondanton kun la edzino . "Ili vizitis min okaze de mia operacio pri la mano (karpa kanalo) . La edzino komplete mastrumis, la edzo (eks-kuracisto) faris miajn bandaĝojn . Sed, kompreneble, ili estis kontentegaj : ĉar ne estas maro en Ĉeĥio, ili kaptis la okazon por longege sin bani . Pro la varmego tio estis tre aprecita, ankaŭ la pureco de la marakvo multe mirigis ilin" .

**NDLR :** SFS volonte aperigas raportetojn pri travivaĵoj / spertoj en Esperantio, ĉu pri gastigado de eksterlandaj esperantistoj, ĉu pri vojaĝo eksterlande, ktp . Ne hezitu sendi kelkajn liniojn ! E<sup>o</sup> vivas kaj utilas .

**Gratulojn :** En "L'Hérault du jour" de la 20a de septembro aperis longa artikolo kun foto sub la titolo "Rencontre avec une retraitée heureuse" . La feliĉulino estas nia amikino Fernande Terral, kies talentoj (poezio, muziko, esperanto...) estas konataj de ni . Konkludo de la artikolo : Emeritiĝo ? Vivo komenciĝas ! Gratulojn al la intervjuistino kaj la intervjuintino (Jacqueline Maurel por la okazo) !

### LA CANOURGUE (48)

Post la turisma semajno (6-13 IX) aperis raporto en "Lozère Nouvelle" de la 3a de oktobro . Jen ĝi .

## Espéranto : de La Valette à La Viallette

Ils se sont rencontrés il y a 2 ans à La Valette, "capitale" de Malte, à l'occasion d'une semaine de tourisme en Espéranto. Ils se sont retrouvés dernièrement en Lozère près de La Canourgue pour une nouvelle semaine de tourisme. Il y avait une vingtaine de personnes, en majorité des Belges, flamands, en fait de quatre nationalités différentes.

"Por ni, ne ekzistas problemo de komunikado" disent-ils dans la langue internationale. Vite adaptés à la bonne cuisine du terroir d'Anne-Marie et guidés par la famille Hémin, ils n'ignorent presque plus rien de la Lozère et de l'Aveyron.

Si le soleil n'a pas été de la partie, la convivialité a régné et les découvertes d'une région, superbe mais peu connue à l'étranger, ont été très variées et appréciées de tous.

La semaine a commencé par la visite de Vulcania et s'est terminée au Puy-en-



Velay par les fêtes Renaissance du Roi de l'Oiseau, sous la houlette des espérantistes locaux qui les ont chaleureusement accueillis.

Rendez-vous a été pris pour une autre

semaine, peut être de nouveau en Lozère, à moins que ce ne soit à Pékin ou Bilbao en 2004, en Lituanie en 2005 ou au Japon en 2007, à l'occasion de grandes rencontres espérantistes.

**MONTPELLIER**

*Dum la someraj ferioj la grupanoj multe vojaĝis, al Göteborg, Bouresse, La Chaux de Fonds, Plouézec, Sète. Certe pro granda okupateco, ili ne trovis la tempon raporti por SFS!*

**Forumo de Asocioj** : Ĉijare nia budo ricevis multajn vizitojn kaj ni devis respondi multajn demandojn, ofte de gejunuloj . Ni ankaŭ disdonis multajn dokumentojn, ekzemple 120 novajn prospektojn, kiujn ni donis nur al interesataj personoj .

**Venontaj kunvenoj** : sabate en la kufima loko (l'Escoutaire) ekde la 10a horo, la 11an de oktobro, la 15an de novembro, la 6an de decembro (por la Zamenhofa tago), la 10an de januaro .

**"Réinsertion et E°"** : vidu ankaŭ la duan paĝon . RE ankaŭ vendas glubendon por veturiloj kun la jena franclingva teksto : "L'Europe a une monnaie unique, l'euro / Il lui faut une langue commune, l'espéranto" . La glubendo ekzistas nun en 7 aliaj lingvoj . Por detaloj, tel. 04 67 75 62 98

La asocio havos sian ĝeneralan kunvenon ĉe "Association Passerelles" 26, rue Enclos-Fermaud (300 metrojn de la stacidomo) je sabato, la 8a de novembro, ekde 14h30 .

**"E°, Culture et Progrès" : internacia semajno de Sète**

Ĝi kunigis 35 personojn el diversaj landoj . Pierre Babin, malhelpata, ne povis veni; lin anstataŭis Daniel Moirand el Aix en Provence, kiun ni havis la plezuron renkonti kaj aŭdi okaze de la federacia kongreso en Quissac .

**Atentigo /Attention !**

*Le texte qui suit a été rédigé par deux jeunes participants de la "semaine", qui ont demandé expressément de ne rien modifier et de laisser les erreurs éventuelles . La raporto, kiu sekvas, estis redaktita de du junaj partoprenintoj de la "Semajno", kiuj petis, ke la teksto aperu nepre sen modifoj, do kun eraroj . Konsentite, sed traduko de franca teksto en alian lingvon estas malfacila sporto . Pensu kaj verku rekte en E° !*

**Paroloj de komencantoj** : Trideko personoj partoprenis, fino aŭgusto 2003, al la Internacian Esperanto-Staĝon, disvolvigis, kiel ĉiu jaro de antaŭ dudeknaŭ jaroj, en Sète (Hérault, Francia) . Dum unua semajno renkontrigis sep naciecoj . La partoprenantoj dispartiĝis laŭ tri gradoj de la lingvo instruado .

En la (bonega) grupo de komencantojn, ni estis ses partoprenantoj . Por ni, la duajn novalojn, tiu staĝo konsistis al intensa kaj eltenema afero (jes ja) . Tio pasis inter : la strando (studia), la ĝardenoj, la manĝaloko, la libroservo, kaj la kursosalono . Ni volas danki varme nian instruistinon, Sofia, ĉar ŝi alportis, rimedojn kaj metodajn-ilojn, por adapti la kurson, laŭ malegalecaj niveloj ekziste interlernantoj .

Por mi, Franko, mi nur spertis de kelkaj monatoj da kurso, en Prades (Pyrénées), kun Kristiano Pinard .

Kun malmulte da nocioj, mi havis grandan antaŭtimin registrigi al tiu staĝo . Se, tio estis tre positiva por mia progresado en la pratiko gramatiko kaj vortotrezoro .

Por mi, Patriko, la unua semajna staĝo kiu efektiviĝis, tri monatojn antaŭe, en Vias (Hérault), estis tre intensa : mi beneficis helpata aŭto-instruado, en kooperado kun Simone Bernard (kiu ankoraŭ, mi dankas tutkore) . En ĉi tie staĝo, mi povis sufiĉe retrovi la materio, pli aŭ malpli enkapiĝita . Tiale, mi remarkus, unuaparte, ke, por malkovri la lingvon, por komenci, eble estas profite lerni individue . Aliparte, mi dirus ke, formado estas pli lernantoafero (kiu formas lin mem), ke la afero de la instruisto (kiu donus la formon...)

Post tiu staĝo, ŝajnas al ni, ke unua ĉefa malfacilaĵo estas, pri ekzemplo, de alveni al disigi, vortojn kaj frazojn, dum aŭdado aŭ lego -unuatempe la vortoj venas tutkune enfrapiĝi ĉe niaj malfeliĉaj cerboj . Tio, kaj de malproksime, ne ankoraŭ enkapiĝis; vi povas kompreni, ĉu ne ?

Koncerne la "Familiacentron Lazaret" (loko de la staĝo), ni kontentis pri la ne totala komerca rilato, alidire pri la sociala aspekto, kiel tiel pri la ĉesto kaj la diverseco de somerumantoj .

Ni ŝatis la grandan atenton de la malnovaj esperantistoj por la novoj . Ni vidas ĉi tie daŭrecon vidalvide la intergeneraciaj kunecoj, ankaŭ zorgon pri la transdono de la transnacia lingvo .

Ĉar, la profunda sulko fosita per la bela fondintino restas fekunda...

Ĉar, la libroservo estas, en kvanto kaj kvalito, tre bone varoriĉa, per nelacibla "lacinto"...

kaj Ĉar, la ventilado, tuj kiam persistas la varmeco, fare de ... ventumilosviganto... (ĉiu rekonos ĉiu...),

tiam..., ni pensas povi rekomendi, ĝojege, tiun rikontigan momenton . Averte por la hezitemaj por venonta jaro!...

Saluton kaj Frateco,

Ĝis baldaŭ,

Franko kaj Patriko,

Staĝantoj aŭgusto 2003, Sète (Francia)

**PRADES (P-O)**

Informoj pri la grupo aperis en la gazetaro (ĉi-poste el "L'Indépendant" de la 1a kaj 3a de septembro).

**Première rencontre  
des espérantistes  
sud et nord catalans**

En marge de l'Université catalane d'été s'est tenue la première rencontre entre les espérantistes du nord et du sud de la Catalogne. Cette réunion informelle, annoncée dans les bulletins espérantistes, a réuni une dizaine d'entre eux à la terrasse du bar du Marché. Les espérantistes pradéens, fraîchement émoullus, ont ainsi pu mettre à profit leur nouvelle langue et en apprécier la facilité pour s'exprimer et converser. Après trois heures d'échanges, ils ont convenu de se retrouver en organisant une "trobada esparantista" plus formelle. Ainsi l'UCE qui a donné il y a quelques années des cours d'espéranto, pourrait devenir le cadre d'une rencontre annuelle.

Esperanto Conflent. Ce mercredi à 20 h 30, au 85 rue du Palais de justice (local de l'association Mosaique) présentation de la langue internationale Esperanto. Les cours de perfectionnement reprendront le 4 septembre à 20 h 15 et le 10 septembre à 20 h 15 pour les débutants.

Ankaŭ retmesaĝo de la 8a de oktobro estas:

Karaj geamikoj,  
Nova ttt-paĝo pri turismo naskiĝis en nia ttt-ejo : <<http://perso.wanadoo.fr/esperanto-conflent/conflent.htm>>

Ĉi estas la rezulto de nia jara laboro, uf...  
kaj ĝi estas daŭrigota !  
Ni esperas, ke ĝi plaĉos al vi ĉiuj .  
Ĉis baldaŭ, via

Kristian (Pinard)

Ĉi-poste la unua parto de okpaĝa dokumento, bele ilustrita :

## CONFLENT, TREZORO EL NORD'KATALUNIO

### Vizitinda, vizitenda...


Saluton, karaj gelegantoj !

Tiuj paĝoj celas prezenti nian regionon, Conflent (prononcu : "kunflen"), kiu kuŝas en la norda parto de Katalunio aŭ en la suda parto de Francio, laŭ kiel oni rigardas la mapon ;-). Ni esperas tiel, ke vi havos la emon viziti ĝin.

Verkis tiujn paĝojn la gelernantoj de la juna grupo "Esperanto-Conflent, la verda stelo el Canigo". La ideo estis laborigi la grupon kreante ion, kio povus esti utila al ĉiuj ; tiel naskiĝis tiu projekto. Pro tio, kiam vi vidos erarojn, bonvolu ne skribi malĝentile (mi ŝercas...kvankam!) sed male korekti nin : tiel, vi helpas nin plibonigi nian verdan lingvon. Kaj, kiam vi venos en nia regiono, ne hezitu nin kontakti : tiel, ni povos praktiki esperanton ! Antaŭ'dankon

Ĉi sube, vi legos pri :  
Nia loka ĉefurbo, Prada

Niaj vilaĝoj kaj monumentoj: Ria , Eus, Taurinya, Sant Marti del Canigo, Mosset, Espira de Conflent, Ballestavy, Arboussols - Marcevol, Joch, Finestret, Cornella de Conflent, ...



### **LASTMINUTE : ESPERANTA RENKONTIĜO EN CONFLENT (LA 8AN KAJ 9AN DE NOVEMBRO)**

Sekve de la neplanita renkontiĝo en Prada en Aŭgusto (vidu ĉi-supre), por fortigi la ligojn sudajn-nordajn, ni organizas ion kun pli da homoj kaj pli da tempo . Respondekas Cristià Pinard (Prada) i Mon Cardona (Sants) Dum la renkontiĝo oni uzos ĉefe esperanton kaj foje la katalunan pro/por la komencantoj .

**Programo** : **Sabaton** : 10h30 : alveno, vizito de la sabata foiro 11h30 : piedirado al St Miquel de Cuixà 13h : kampara tagmanĝo 14h : komentata vizito de la monaĥejo 15h : reiro al Prada, vizito de la tombejo 19h30 : vespermanĝo kaj "arta vespero" (kantoj, dancoj, ludoj, ktp)

**Dimanĉon** : 9h : matenmanĝo 10h : promenado, interŝanĝaj ludoj 13h : tagmanĝo de la amikeco 14h30 : postmanĝo, ŝercoj, ludoj, babiladoj... 16h30 : adiaŭo Loko de la renkontiĝo : vilaĝo Mosset La prezo (40<sup>E</sup>) inkluzivas la sabatan vespermanĝon, la tranokton , la dimanĉajn matenmanĝon kaj tagmanĝon *Pro la limigata nombro da lokoj, oni akceptos nur la unuajn aliĝintojn .*

Petu aliĝilon de SFS aŭ de Christià Pinard 23, Rue de l'Hospice 66500 Prada (04 68 05 24 41)

**ĜE NIAJ NAJBAROJ : ARIÈGE**



**Staĝoj en Montferrier, piede de Pireneoj, de la 28a de februaro ĝis la 6a de marto 2004** ←

La staĝon "Koruso" gvidos juna dana korusestro Jesper Jakobsen : diversaj plurvoĉaj kantoj el diversaj landoj kaj epokoj .

La staĝon "Esperanto por komencantoj" povas sekvi plenkreskuloj kaj junuloj, kiuj nenion aŭ preskaŭ nenion scias pri la internacia lingvo .

Horaroj : ĉiutage 5 horoj da studado + ripozo, skiado, vizitoj, ludoj, spektakloj, prelegoj, koncertoj...laŭ viaj afablaj proponoj kaj niaj zorgaj klopodoj .


Petu la informilon/aliĝilon de SFS aŭ de Claude Fressonnet 43, Place du Rumat 09500 Mirepoix  
(Tel : 05 61 60 18 95 aŭ rete : [claudio.fressonnet@wanadoo.fr](mailto:claudio.fressonnet@wanadoo.fr))

**TOULOUSE****KONCERTO KUN ĴAK LE PUIL KAJ JOMO**

Okaze de la registrado de sia unua disko en la studio de Vinilkosmo, Ĵak Le Puil prezentos siajn novajn kantojn .

Akompanos lin per gitaro Jomo, kiu ankaŭ prezentos siajn famajn kantojn .

La koncerto okazos sabaton, la 25an de oktobro, je 21h en MJC Ancely . Enirbileto

**Aliaj rendevuoj :**

-Rapidkurso (6 semajna) : ĉiulunde ekde la 15a de septembro kaj de la 3a de novembro

-7an de novembro : jarkunveno kaj manĝoklaĉo (19h en Maison de Quartier Ranguel - 19, Rue C. Forbin)

-7an de decembro : **Zamenhofa tago** en Centre de Loisirs St-Agne-SNCF, 65 Rue St Roch

12h : tagmanĝo 15h30 : arta programo , babilado kaj debateto, disko- kaj libro-servo

Samtage : Jara kunveno de la federacio "Midi-Pyrénées" de la 10a ĝis la 12a h .

Informoj : 05 61 25 55 77 <http://esperanto.toulouse.free.fr> Retadreso : [toulouse@esperanto.org](mailto:toulouse@esperanto.org)

**INSTRUILOJ KAJ INFORMILOJ**

Komence de nova lerneja jaro, Esperanto-France (4 bis, Rue de la Cerisaie 75004 Paris Tel 01 42 78 68 86 Fax 01 42 78 08 47 CCP 855. 35 D Paris) proponas al vi diversajn dokumentojn .

**Instruiloj** (ekspedokostoj entenataj) :

Metodo 11 (unuagrada -500 bazaj vortoj) 5<sup>E</sup>50 (5 ekzempleroj 22<sup>E</sup> , 10 ekzempleroj 38<sup>E</sup>)

Metodo 12 (duagrada) : 5<sup>F</sup>80 ( 5 ekz: 23<sup>F</sup>50; 10 ekz. 39<sup>F</sup>)

Gvidilo por M11+M12 : 3<sup>E</sup>80

Kasedo M11 : 7<sup>E</sup>60 Kasedo M12 : 9<sup>E</sup>15

Metodo 10 (intensivaj staĝoj) : 2<sup>E</sup>40 (10 ekz : 17<sup>E</sup> 50 ekz : 91<sup>E</sup>) Gvidilo M10 : 0<sup>E</sup>75

Metodo 15 (konversacia trejnilo) 3<sup>E</sup>30 (10 ekz. 23<sup>E</sup> , 50ekz. 122<sup>E</sup>)

E°-juniors : M3 (kolekto/prezentilo al gejunuloj) : 0<sup>E</sup>75

Nouveau cours d'Espéranto (Ludwig-Triolle) : 13<sup>E</sup> Kasedo de NCE : 7<sup>E</sup>62 Libro + kasedo : 20<sup>E</sup>

"Parlons Espéranto" (Joguín) 22<sup>E</sup> 90

**Informiloj** (sen prepar-/send-kostoj)

Le premier des 10 Rendez-vous - senpage

Broŝuro : E° mode d'emploi : 11<sup>E</sup> (30 ekz)

Prospekto : Le monde au bout de la langue : 10<sup>E</sup> (125 ekz)


Kasedo : à la découverte de l'E° 2<sup>E</sup>30

Broŝuro : E°, un droit à la communication : 20<sup>E</sup> (25 ekz)

E°, un facteur de l'avenir européen : 2<sup>E</sup>30

Vizitkarto "Connaissez-vous l'E° ?" : 2<sup>E</sup> (50 ekz)

E° et enseignement : 15<sup>E</sup> (50 ekz)



## **"STAGOJ EN "LA KVINPETALO" DE BOURESSE**

Pluraj federacianoj de Béziers kaj Montpellier staĝumis en Bouresse kaj entuziasme raportas .

Foje mankas la nomo de la raportinto... Foje alvenis du raportoj pri la sama temo !

Unue pri muziko, la dua internacia lingvo...

### **Staĝo de du muzikistinoj el Béziers en "La kvinpetalo" :**

Esperanto kaj muziko... la temo de la staĝo tre plaĉis al ni, do ni iris al Bouresse de la 11a ĝis la 17a de aŭgusto . Malgraŭ la varmego, la loko estis agrabla : dometoj ĉirkaŭ ĝardeneto, en kiu 7 katoj dormis aŭ promenis . Dum 4 tagoj ni kantis, ludis muzikon; oni eĉ povis sekvi kursojn pri esperanto, gviditajn de Josée el Montpellier .

Anne-Sophie Markov, gvidantino de la staĝo, parolis pri multaj esperantaj kantoj, ekzemple "La Espero", ankaŭ pri kantoj tradukitaj de G. Lagrange aŭ de la epoko de la kabaredo de Raymond Schwartz .

Unu grupeto kun 3 gitaristoj (Lino, Guillaume, Teo), 2 flutistinoj (Geneviève, Flora) kaj 1 mandolinistino (Line) studis pecetojn de renesanca muziko . Por ni estis tre interese kaj agrable ludi kun junaj kaj bonaj muzikistoj .

G. Lagrange parolis pri sia metio de piano-agordisto . La metio ripozas sur matematiko . Li skribis multajn ciferojn sur la tabulo . Finfine, la oreloj de la agordisto kaj de la muzikisto faris, ke la instrumento sonas ĝuste por la plezuro de la aŭdantoj . Feliĉe, ni povas ludi sen bone kompreni tiun matematikon .

Ĵaŭdon vespere, post la tre agrabla manĝeto en la ĝardeno, Renato Corsetti (Prezidanto de UEA) kaj Anna Löwenstein respondis pri niaj diversaj demandoj . Ili parolis pri la eŭropa baloto, la gramatiko (esperantista aŭ alia), Esperanto en la mondo . RC diris, ke nuntempe esperanto kreskas ĉefe en nigra Afriko, en centra Azio, sed ke ĝi povas esti malbone uzata por religia, politika aŭ alia propagando : tiel, la ideo de Zamenhof estas devoĵigita de sia celo . Li rakontis amuzajn anekdotojn por ilustrii siajn dirojn .

La lastan vesperon, ni faris koncerton por la loĝantoj de la staĝejo . Ni prezentis la rezulton de nia laboro . La junaj muzikistoj en dueto aŭ trio (duope aŭ triope) ludis kelkajn belajn, novajn muzikaĵojn, verkitajn de Lino Markov, la gvidanto de la muzika parto . Nia grupo interpretis : "leĝera danco", "pavano", "vilaĝa danco" .

Akompanata de la gitaro de Lino, Josée recitis sentoplenan poemon pri esperanto, verkita de ŝia grupo .

Evidente, ni multe kantis... La prezentado plaĉis al la tuta publiko, kiu aplaudis fervore .

Poste, gaje, ni trinkis kune al la sukceso de la koncerto kaj de la staĝo . Tiu-ĉi entuziasmigis nin, sed ni trovis ĝin tro mallonga . En 2004, ni dezirus minimume 8 ĝis 10 tagojn por pli bone labori .

Plie, la etoso estis tre agrabla, la gegvidantoj tre eminentaj kaj niaj gekamaradoj tre afablaj .

Bona staĝo, granda plezuro !

Geneviève Gaubert + Line Maurel



### **Kara mandolino (teksto iom mallongigita por eviti ripetojn)**

La mandolino de Line (NDLR : franclingve la mandoLine de Line) travivis etan aventuron ĉi-somere, dum la muzika staĝo en "La Kvinpetalo" . Lino Markov, la filo de la gvidantino de la kurso, estas sentema muzikisto (kaj gitaristo) . Ĝis nun, li ne estis vidinta mandolinon, kaj tuj li eksentis kortuŝon pri tiu bela mandolino .

Ĉar la staĝo estis tute ne senokupa, la lastan vesperon Lino demandis al Line : "Ĉu vi bonvolas pruntedoni al mi vian mandolinon ĝis morgaŭ matene ? Muzika ideo obsedas min maj mi dezirus komponi ĝin ĉi-nokte " . Line iomete hezitis, ĉar la morgaŭan matenon ni devis foriri al la stacidomo de Lussac-les-Châteaux je la sepa horo . Sed la gefratoj Markov estas fidindaj junuloj, kaj Lino certigis, ke je la sepa la mandolino atendos Line en la manĝoĉambro . Dirite, farite !

Do, je la sepa matene, la mandolino kuŝis sur tablo de la manĝoĉambro . Trankviligita, Line appetite maten-manĝis . Helga, kiu ludis la rolon de taksistino (grava laboro), alvenis akurate kaj rapide, rapide, la valizoj estis enmetitaj en la valizujon kaj ek al la stacidomo !

Sur la kajo, ni adiaŭis Helga . Ekplugetis kaj prizorgante la valizojn, subite mi miris : "Line, kie estas via mandolino ?" Kun granda malfermita buŝo, Line cerbumis kelkajn sekundojn :

"- Ne, ĝi ne restis en la aŭto, ĝi ankoraŭ kuŝas sur la tablo en "La Kvinpetalo" . Ha, kia fuŝaĵo ! Mi ne povos ludi tiun someron! Feliĉe ĝi ne estas perdita " .

Post interparolado, la trajno ekaŭdiĝis de malproksime kaj, samtempe, la voĉo de Geneviève : "Line ! Line ! Jen via mandolino !" Senspirigita, Geneviève atingis nin lastmomente . Uf !

Dum la vojaĝo, la Kara Mandolino estis senĉese prizorgata de ni ambaŭ, kaj, feliĉe, ĝi rehejmiĝis .



### Staĝo pri Ĉe-metodo en Bouresse


Dum la monato septembro, Ed. Borsboom gvidis tiun staĝon en Bouresse . Kun li venis ankaŭ 5 aliaj Nederlandanoj kaj unu flandra Belgino (korespondantino de nia amiko Jorgo) .

Tiuj eksterlandanoj estis vere vivĝojaj, kaj ili tre aprezis la francan vinon, ĉefe la blankan vinon de Béziers, kiun alportis Vito .

Tiu varmega etoso devigis nin paroli, paroladi Esperanton, sen iu ajn krokodilaĝo .

Francoj kaj Nederlandanoj organizis vesperan feston, "La Kabaredo de la Kvinpetolantoj", kiu ricevis grandajn aplaŭdojn .

Ed. Borsboom lerte rakontis pri Pastro Cseh, kaj ĉefe prezentis sian libron : "Vivo de Andreo Cseh" . Estis interese vidi alian metodon por lernigi E-on, sed persone, mi konfesas, ke mi preferas legi ol ripeti frazojn kiel infaneto . Tiu opinio koncernas nur min . Feliĉe, ke en Francio libereco pri opinioj ekzistas "ankoraŭ" !



### Ekumenismo

De la 12a ĝis la 19a de septembro okazis staĝo en la eta vilaĝo Bouresse, dum kiu prelegis E. Borsboom pri Ĉe-metodo .

Dum la staĝo, en la malgranda mezepoka preĝejo, Pastro Albreecht Kronenberger el Germanio celebris meson en Esperanto . La kunvenantoj, Nederlandanoj, Belgoj, Germanoj, Francoj, nekredible kantis kaj komprenis liturgion . Oni aŭdis kortuŝajn religiajn kantojn sub la direktado de la Pastro .

Oni uzis "Adoru", ekumenan libron dediĉitan al la memoro de Joseph Metzger (1887-1944), pioniro de ekumeno, martiro de paco kaj unueco en Kristo, vera Esperantisto .

Ni ĉiuj ege dankas la Pastron de Bouresse pro la pruntedono de la preĝejo, kaj ni estas ege kontentaj pri la ĉeesto de kelkaj enloĝantoj aŭ "Bouressanoj" .

### Pri unuiĝo de popoloj

*Ni vidas kutime, ke malfeliĉo kaj malriĉeco regas sur la tero . Ne nur la tria mondo estas Infero . Migrado de homoj,*

*Rapida movo de la varoj,*

*Facila perreta fluo de ideoj,*

*Devigus la popolojn unuiĝi .*

*Kial ? Grava problemo !*

*Ĉu la respondo estas Internacia Ekonomio ?*

*Militoj deciditaj de Altranguloj ?*

*Kiam la popoloj unuiĝos,*

*Tiam ĉiuj liberiĝos .*

*Kiel ? Grava demando !*

*Ĉu la potenculoj rezignos pri siaj povoj ?*

*Ĉu la homoj iĝos egalaj antaŭ leĝo kaj kulturo ?*

*Estas ebleco, kiun la estraro ĉiam rifuzis .*

*Ni, Esperantistoj, havas solvon de jam unu jarcento .*

*Esperanto, neŭtrala pontlingvo, jam komencis sian laboron por realigi sian Idealon :*

*JUSTECO, EGALLECO, FRATECO, AMO .*

Tiu teksto estas la rezulto de multaj klopodoj kaj cerbumadoj de :



Andrée Descusses, Etsuko Nakazawa, Aŭgusto D'Ubaldi kaj Josée Boccadifuoco .

*Gratulojn !*

**Esperanta klubo en Lunel**

La unuan semajnon de oktobro komenciĝis en la kolegio "Sainte Thérèse" de Lunel E°-klubo por 10- ĝis 15-jaraĝaj gejunuloj . Du geinstruistoj de la kolegio gvidas proksimume 30 gelernantojn . Ili uzas la ĉe-me-todon kaj alternigas ludojn, "babilrondojn", kantojn kaj ekzercojn per la reto .

Jam la infanoj skribis kaj sendis mesaĝeton al Bulgario Ili baldaŭ kreos sian TTT-ejon. Ili interŝanĝos kun sep lernejoj en Benino, Kamerunio (Douala), Ukrainio (Kijivo), Uzbekistano (Taŝkento), Kroatio (Zagreb), Pollando, Brazilo ... Jen ilia adreso : Club Espéranto Collège Sainte Thérèse 66, cours Gabriel Péri 34400 Lunel Bonvolu sendi al ili poŝtkarton por instigi ilin progresi lingve . Dankon !

**Feria semajno en Pluezek (Plouezec)- Bretonio :**

Okaze de la sepaj Bretonaj Renkontiĝoj de Plouezec, proksimume 150 esperantistoj el diversaj landoj (Anglio) Francio, Hispanio, Italio, Kroatio, Nederlando, Pollando, Svislando...) pasigis sunan kaj interesan semajnon . Dum la staĝo okazis pluraj prelegoj de Barbara Pietrzak (pola radio), Renato Corsetti (Prezidanto de UEA) . Plurnivela lernado de E° (eĉ por geinstruistoj), ekzercoj perrete (krei TTT-ejon) agrable alternis kun folkloraj vesperoj (maristaj kantoj kaj bretonaj dancoj) kaj turismaj ekskursoj (al la muelejo de "Kraka", al la fama abatejo de Beauport, al la templo de Lanlef, al la kapelo de Kermaria, al la bela rozkolora marbordo) . Kelkaj el la partoprenantoj povis admiri la marbordon ĝis "Mont St Michel"aviadile! La akcepto estis tre afabla. Ĝis la venontaj okaz Pluezekaj Renkontiĝoj !

**ALVOKO AL LA ESPERANTISTOJ**

BKC : Brusela Komunikad-Centro estas en danĝero . En mallonga tempo ĝi faris konsiderindan laboron por informi pri esperanto kaj la lingva problemo en "ŝlosil-urbo" de Eŭropo . Sed la funkciado kostas multe kaj UEA ne povas daŭrigi sian financan subtenon . En 2002 kaj 2003 ĝi donacis entute 51.000<sup>E</sup>, la landaj asocioj enspezigas al EEU proksimume 6.000<sup>E</sup> . La dungokostoj de unu fakula ĵurnalista en Bruselo estas po 41.000<sup>E</sup> jare . Do, sen la subteno de UEA, Eŭropa E°-Unio devas serĉi monfontojn je 35.000<sup>E</sup>, sen konsidero de aliaj kostoj kiel staĝanto, vojaĝoj, oficeja ilaro, ktp .

Pro tio la lanĉo dum la Gotenbarga kongreso de la kampanjo "VETO" (veto je la pluvivo de BKC) . La "veto jam amasigis proksimume 20.000<sup>E</sup> . La ideo estas, ke 200 esperantistoj promesu donaci 0,5 procenton de sia jara enspezo por certigi la pluvivon de BKC . Kun jara enspezo de 20.000<sup>E</sup> (aŭ 1.666<sup>E</sup> monate = 10.932F), tio reprezentas 100<sup>E</sup> por celo ne nur utila, sed nepra . Helpo estas bezonata en 2004 sed ankaŭ en la postaj jaroj . "Ni finvenkos en Bruselo nun aŭ neniam poste ie ajn", diris R. Corsetti, prezidanto de UEA .

Helpopromeson oni sendu al UFE, kun mencio "veto" (le pari) . Se la sumo de la promesoj atingas la bezonatan sumon, en novembro 2003, la promesintoj estos tiam petataj transsendi la monon . Se ne, bedaŭrinde la BKC devos ĉesigi sian agadon en januaro 2004 .

**"Ĝangalo" (surreta portalo)**

Ĝi lanĉis antaŭ nelonge "Ĝangalo por komencantoj", kun ĉiumonate novaj bildoj, noticoj, tekstoj, muzikoj, eksplikoj, tabeloj, ktp . Do, utile por komencantoj de E° aŭ en klasĉambroj .

Sesmonata abono kostas 18<sup>E</sup> (tutjara : 35<sup>E</sup>) . La notico-portalo Ĝangalo ([Http://gxangalo.com](http://gxangalo.com)) daŭre restos senpaga (ĉiutagaj informoj pri la mondo, babilejo, forumoj, ludoj, meteorologio, muzik-portalo, ktp).

Nun la teamo de Ĝangalo volas dividi kun la esperantistaro la defion establi la unuan interretan televidkanalon tute en Esperanto ... sed jam aŭdiĝas voĉoj, ke ne eblas tiu projekto...

**Internacia Turismo**

"Esperantotur" (Bydgoszcz -Pollando) proponas diversajn vojaĝojn por 2004 . Jen kelkaj el ili : 15.01 ĝis 08.04 : Ok vojaĝoj tra Suda Ameriko 13.02 ĝis 28-02 : Internacia Simpozio pri E°-turismo en Argentino, Urugvajo, Brazilo kun karnavalo en Rio de Janeiro

En la longa listo (18 proponoj) : Centra Ameriko (Marto-Aprilo), Antiloj-Karaiboj (Majo), Nordeŭropo kaj baltaj landoj (21.06 ĝis 16.07), flugvojaĝoj al la UK en Pekino kaj Ĉinio (Julio-Aŭgusto), Busvojaĝo el Pollando al la Eŭropunia kongreso en Bilbao kaj Maroko (6.08.31.08)... Kompreneble la tuto kun interesaj prezoj !



## DÉFENSE DU FRANÇAIS

Extraits du rapport sur les langues dans l'Europe élargie, présenté par M. Herbillon à l'Assemblée Nationale en juin/juillet 2003 et utilisé dans le récent article de Télérama (voir en première page).

Les extraits sont indépendants les uns des autres (choix subjectif). La totalité du texte peut être consulté sur <http://www.assemblée-nat.fr/12/europe/rap-info/i0902.asp> ou en format pdf <http://www.assemblée-nat.fr/12/pdf/europe/rap-info/i0902.pdf>

### Les compétences linguistiques des citoyens de l'Union

(en %)

Langue	Proportion de la population de l'UE dont c'est la langue maternelle	Proportion de la population de l'UE dont ce n'est pas la langue maternelle	Proportion totale parlant cette langue
Allemand	24	8	32
Français	16	12	28
Anglais	16	31 ?	47 ?
Italien	16	2	18
Espagnol	11	4	15
Néerlandais	6	1	7
Grec	3	0	3
Portugais	3	0	3
Suédois	2	1	3
Danois	1	1	2
Finnois	1	0	1

Source : Eurobaromètre.

En 2003, seuls sept pays de l'Union européenne imposent deux langues vivantes obligatoires dans leur système éducatif. Ces pays sont l'Autriche, la Finlande, la France, l'Espagne, le Luxembourg, les Pays-Bas et la Suède. En Belgique, seule la Communauté flamande de Belgique impose l'enseignement de deux langues vivantes obligatoires.

### Les Européens et leur perception des langues

(Ces questions ont été posées à l'ensemble des personnes interrogées)

	D'accord (en %)	Pas d'accord (en %)	Ne sait pas (en %)
Tout le monde dans l'Union européenne devrait être capable de parler une langue européenne en plus de sa langue maternelle	71,1	20,2	8,7
Tout le monde dans l'Union européenne devrait être capable de parler anglais	69,4	22,5	8,1
L'élargissement de l'Union européenne pour inclure de nouveaux pays membres signifie que nous devons mieux protéger notre propre langue	63,4	22,6	14
Il y a de bonnes possibilités d'apprendre les langues pas loin de chez moi	40,4	29,7	30
L'élargissement de l'Union européenne pour inclure de nouveaux pays membres signifie que nous devons commencer à parler une langue commune	38	46,8	15,2
Dans ma région, les gens sont plutôt doués pour parler d'autres langues	34,3	39	26,7

Par ailleurs, la défense de la diversité linguistique suppose que chacun puisse s'exprimer dans sa langue maternelle. Cela n'est d'ailleurs pas neutre quant à la qualité des débats étant donné qu'on ne peut pas bien traduire ce qui est mal dit... Par ailleurs, imposer à une personne de s'exprimer dans une langue étrangère place celle-ci dans une position d'infériorité par rapport à son interlocuteur qui peut parler dans sa langue maternelle. Dans une négociation, la langue est un instrument de pouvoir et l'égalité ne saurait être rompue au grief de considérations budgétaires


### Du Volapük à l'Esperanto, ou la quête d'une Lingua Franca

On recense plusieurs tentatives dans l'histoire de l'Europe de créer une langue supranationale. Le Volapük, première langue « construite » à avoir atteint un certain niveau de popularité est l'œuvre d'un moine allemand et date de 1880. Trop complexe, le Volapük a été abandonné par ses adeptes au profit de l'Esperanto, langue inventée en 1887 par le Dr Zamenhof. Cette langue véhiculaire est fondée sur une orthographe simplifiée par sa nature phonétique puisque tous les mots s'écrivent comme ils se prononcent. Né en Europe, l'Esperanto sera adopté par plus de 80 pays, particulièrement le Brésil et le Japon, et surtout la Chine où il est enseigné à l'université. Il sert à la traduction de livres scientifiques et techniques et il est parfois utilisé à la radio et dans la presse spécialisée.

Quant à la question d'une langue commune, il a souligné que l'espéranto était certes pratiqué et enseigné dans quatre-vingts pays, mais que la vraie *lingua franca* est en Europe une forme d'anglo-américain abâtardi. Le combat pour le français ne peut donc viser qu'à conforter sa position de seconde langue étrangère la plus choisie. Au sujet des langues régionales, il faut remarquer que le catalan est certes moins parlé que le polonais dans l'Union élargie, mais qu'il y compte plus de locuteurs que des langues nationales comme le hongrois ou le tchèque.

\* le rapporteur

## KRUCVORTOJ



## Solvaj de la n° 165 :

**Horizontale** : I. Kontraband II. Onomatopeo  
 III. Rob/Diyorc IV. Emetik/Ve V. Salik/Mk  
 VI. Pt/Nazaret VII. Ooo/Larik VII. Npln/Libro  
 IX. De/Embaras X. Eozin/Nina

**Vetikale** : 1. Koresponde 2. Onomatopeo  
 3. Nobel/OI 4. Tm/Tin/Nei 5. Radikal/Mn  
 6. Atik/Zalb 7. Bov/Marian 8. Apo/Kribri  
 9. Nerv/Ekran 10. Docent/Osa .


## HORIZONTALE

- I) - Reskribita manuskript(o).  
 II) - Almenaŭ dekduopo.  
 III) - Rozintern(o) / Proviz(i).  
 IV) - Mise flati / Paganilo.  
 V) - Aktoficisto / s : Faro.  
 VI) - s : Hundo / Kontraŭi / s : Respekto.  
 VII) - Eksfeliĉul(ĉo) / Duonkava.  
 VIII) - Ākvoklaŭn(o) / s : Cifero.  
 IX) - Komisi(o) / Skeletoart(o).  
 X) - Ĉelparto.

## VERTIKALE

s : sone

- 1) - Ege, ete, ene...  
 2) - Kristana defend(o).  
 3) - Eta organopart(o) / Vizitant(o).  
 4) - s : Venko de Aleksandro / Birdo kaj insulo.  
 5) - s : Instiganto / Religio komence.  
 6) - Prepozicio / IV / s : Korpoparto.  
 7) - Sporto / sankta librar(o).  
 8) - Infera juĝisto / Riĉa ĉambr(o).  
 9) - Azia land(o) / s : Distingilo.  
 10) - Landa desegno.



BOPARO

## Nekompletaj frazoj :

Trovu la mankantan vorton / rimon . Por vin helpi, parenteze estas samsignifa frazo .

1. Se vi pri ĉio informiĝos, / vi baldaŭ ..... (Ne utilas havi zorgojn pri ĉio)  
 2. Nin ĉiam ravas (tio), / kion ni ne ..... (Deziro ekzistas ĉe ĉiu)  
 3. Al ĉiu besto / plaĉas ĝia ..... (Plej agrable estas hejme)  
 4. Ankoraŭ neniu / plaĉis al ..... (Ĉiam estas malkontentulo)  
 5. Kion leĝo malpermesas, / tio plaĉi ne ..... (Frukto malpermesita / estas plej dezirata)  
 6. Se okulo ne vidas, / koro ne ..... (Oni ne povas deziri tion, kion oni ne konas)  
 7. Kie mi disponas, / tie mi ..... (Mastro decidas)  
 8. Sen mensoga rekomendo / ne iras la ..... (Kelkfoje necesas troigi)  
 9. Ju pli da bruo, / des malpli da ..... (La bruo estas tro laŭta)  
 10. Venas ĉagreno / sen granda ..... (Oni ege bedaŭras)  
 11. Eĉ kontraŭ pastra prediko / troviĝas ..... (Ĉiam estas kontraŭdiranto)  
 12. Kulo nenion valoras, / sed ĝia piko ..... (Malgrandaĵojn oni ankaŭ konsideru !)  
 13. Hazardo/ estas malbona ..... (Ne ĉiam kalkulo kun ŝanco !)  
 14. Prokrastita / ne estas ..... (Konservu paciencon !)  
 15. Eĉ muŝo sentas, / kiam vi ĝin ..... (Bestoj estas vivantaj estaĵoj)  
 16. Gasto sen avizo / estas agrabla ..... (Neatendita vizito estas agrabla)

\*\*\*\*\*

La venonta SFS aperos ....venontan jaron (en januaro 2004).  
 Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 20a de decembro al la kutima adreso :  
 Jean Hénin - Beauregard -Route de Montcayroux - 48500 La Canourgue  
 Telefono / Faksilo : 04 66 32 86 36 aŭ rete Jean.Henin@wanadoo.fr  
 Anticipan dankon kaj plensukcesan jarfinon !